# Pri forteco de HON-IN-BOU Syuuei {本因坊 秀栄}, ktp

Antaŭ ol Syuuei elŝeligi sian veran fortecon, li ofte malvenkis je unu aŭ du poentoj. Post la elŝeligo li ŝanĝiĝas, ke venkis certe je unu aŭ du poentoj, tralegante ludojn.

En liaj ludoj mi sentas naturan fluon. Ekzistas unu ideo, konsekvenca konvinkiĝo. Mi sentas tion en ĉiu el liaj ludoj. Belajn ludojn. Ankaŭ bela estas lia maniero por venki. Li havis denaskan povon por antaŭvidi estontan procedon.

En la antaŭa artikolo skribis, ke sufiĉe akumulita vera forto ekaperis ĉirkaŭ en lia tridek kvina jaraĝo. Mi ne pensis kiel li akumulis sian forton. Eble, unu faktoro estus, ke li estas reala filo de HON-IN-BOU Syuuwa {本因坊 秀和}. La sango de Suyuuwa devus esti talento donita de Dio. Kaj aflikto pro ke li estis naskita en la Majstra familio HON-IN-BOU grande kreskus lin.

La unua jaro de MEIZI {明治} erao, Syuuei estis deksep jaraĝa, kaj 4a DANNulo. Kiam TOKUGAWA {徳川} SYOUGUNa{将軍} Registaro defalis, la HON-IN-BOU familio perdis la privilegion. Devis esti granda afliktoj. Dufoje lia domo brulis. Lia plej maljuna frato freneziĝis.

{paĝo 247 de la originalo}

Por Syuuei la plej kordolore estis, ke kontraŭ dekadenco de la HON-IN-BOU familio, tiame nova organizo HOU-EN-SYA{方円社} kun plej fortulo MURASE Syuuho{村瀬 秀甫} tre prosperis.

HOU-EN-SYA estis fondita en la 12a jaro de MEIZI {1879 p.K.}. Post la morto de Syuuho, venis epoko de Syuuei. Kontraŭ Syuuei, nur TAMURA Houzyu {田村 保寿} (posta HON-IN-BOU Syuusai {秀哉} tenis egaligon 'konstante havi Nigron', kaj ĉiuj aliaj goistoj devis havi egaligon ne pli malgrandan ol 'Nigron-du ŝtonojn'.

Mi rekomendas ankaŭ al amatoroj re-ludi go-registraĵojn de Syuuei.

Ĉagrenas min demandon "Kiu estas pli forta el Syuuei kaj {HON-IN-BOU} ZYOUWA {本因坊 丈和}? Aŭ SAKATA Eio {坂田 栄男} , aŭ TYOU Tikun ｛趙 治勲｝?" La tri majstroj ludis admirindajn ludojn. Tamen iliaj artoj estas originalaj, kiujn amatoroj neniel povas imiti.

Mi interesiĝas kiel nuntempaj goistoj, TYOU kaj TAKEMIYA kaj aliaj plue kreskas. Aliaj plijunuloj havas talenton.

En KANSAI-KIIN {関西棋院: KANSAJa Go-instituto, al kiu USIKUBO 9p apartenas}, jam famaj kun iom da atingaĵo estas 清成 哲也 {KIYONARI Tetuya} kaj 今村 俊也 {IMAMURA Tosiya}. Prosperaj estas 横田茂昭 {YOKOTA Sigeaki}, YUUKI Satosi {結城 聡} kaj aliaj.

{Eble ĉi tiu artikolo estis skribita en jaro ĉirkaŭ 2000.}

{paĝo 248 de la originalo}